Konstanta aldono al „La Policisto“ II-a. jaro No 2-a 1923. Marto Aparte nemendebla

La Poŝtisto - La Fervojisto

Fakrevuo pri: poŝto, telefono, telegrafo, fervojo, tramvojo, aeronaŭtiko, marnaŭtiko kaj radiotelegrafo.

Lasthore alveninta sciigo gravega!

OFICIALA PUBLIKAĴO.

II. F. 157.
1923. III.

Ordono.

Konforme al la graveco, kiun oni devas atribui al la internacia helplingvo Esperanto, mi postulas raporton ĝis la 15-a de majo ĉi-jara pri tio:

a) **kiuj policoficistoj scipovas Esperanton,**
b) **kiuj nun lernas ĝin,**
c) **kiuj intencas lerni ĝin.**

Oni citu oficistojn laŭnome specifiante la restadejojn, la titolojn kaj la oficejojn.

Al la Superaj Prezidantoj de la Provincoj, la Registaraj Prezidantoj, la Polica Prezidanto en Berlin, la Supera Polica Lernejo, la Polica Lernejo pri Gimnastiko, la Ekipaĵa Sekcio.

Berlin, la 19-an Marton 1923
subskribite
Dr. SEVERING
prusa Ministro por intnrn. aferoj.

(Aperis en la 13-a No de la „Ministeria Bulteno“ por la Prusa Interna Administrado.)

La prisupra gravega kaj ĝojiga novaĵo, kiu eble donas tute novan ekon al nia movado en Germanujo estas dankebla al nia eminenta frato, supera Poŝtdirektoro O. Rieck en Greifswald (Germ.) Ĉiu ni salutu nian karegan fraton kaj lian Moŝton la prusan Ministron. Ĉiu leganto menciu al sia ĉefo la grevegan novaĵon kaj klopodu, ke alilande oni same faru.

„I. L. E. P. O.“

Oficialaj sciigoj de la Germana Sekcio de Ilepo.
Kumuniko n-o 1.

Kvankam mi estas daŭre tre okupata, mi danke akceptas la prezidantecon pri la Germana Sekcio de Ilepo, esperante, ke mi trovos efikan helpon de ĉiuj Ilepo, esperante, ke mi trovos efikan helpon de ĉiuj poŝtistaj samideanoj. *Per senlaca, celcerta, praktika laboro ni sukcesos.* Tial ni tuj komencu serioze labori!

Estante sen monrimedoj ni donu ofereme nian laboron al la movado. Ni senkoste propagandu nian aferon en la 20 germanaj poŝtfakaj ĵurnaloj, faru paroladojn en la poŝtfakaj kunvenoj kaj aranĝu esperanto-kursojn. La granda amplekso de la taskoj necesigas dividon de la laboro kaj samtempe la prudentan koncentrigon de niaj fortoj. Faka ĵurnalo pli volonte publikigos unu gravan artikolon ol dek malgravajn sciigojn eble kontraŭdirantajn unu al la alia. Pro tio mi petas ke oni sendu al mi la artikolojn antaŭ la publikigo por ke mi travidu kaj laŭbezone aliigu ilin. En Germanio aperas jenaj poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj gazetoj:

1. Blätter für Post und Telegraphie, Zeitschrift der höheren Post- und Telegraphenbeamten, Berlin (duonmonata, 3000 abonantoj).
2. Deutsche Post, Reichsverband deutscher Post- und Telegraphenbeamten, Berlin (semajna, 162.000 abon.).
3. Deutsche Postgewerkschaft, München (semajna, 32.000).
4. Deutsche Posthalterzeitung, Aŭgsburg (monata).
5. Deutsche Postzeitung, Zeitschrift des Verbandes deutscher Post- und Telegraphenbeamten, Berlin (semajna, 40.000).
6. Der Postagent, Breslaŭ (duonmonata, 10.000).
7. Postalia, Unterrichtsblätter für post und Telegraphie, Berlin (duonmonata, 11.000).
8. Das Postfachblatt, Berlin (dusemajna, 20.000).
9. Postalische Rundschaŭ, Berlin (duonmonata, 10.500).
10. Das Posthorn, illustrierte Familienzeitschrift für Post- und Verkehrsbeamte, Kehl (duonmonata, 7500).
11. Post und Telegraphie, Berlin (dusemajna).
12. Die Postwelt, Zeitschrift für die Post- und Telegraphenassistenten und Anwärter, Berlin (semajna).
13. Telegraphenpraxis, Lübeck (monata, 4000).
14. Telegraphen- und Fernsprechtechnik, Berlin (monata).
15. Unter dem Reichsadler, Zeitschrift des Verbandes der deutschen Reichs-Post, und Telegraphenbeamtinnen, Berlin (duonmonata, 50.000).
16. Die Verkehrsnacrichten für Post- und Telegraphie, Berlin (duonsemajna).
17. Deutsche Verkehrs-Zeitung, Berlin (semajna).
18. Bayerische Verkehrsblätter, München (semajna).
19. Zeitshrift des Reichsbundes der höheren Beamten, Berlin (monata, 11.000).
20. Der Würtienbergische Postagent, Laichingen (duonmonata, 600).

Kiu ne havas spertojn pri la instruado de Esperanto, ne gvidu kursojn, sed konfidu tiun ĉi taskon al spertuloj, precipe al instruistoj.

Mi proponis al la esperantistaro la starigon de „Universala Esperanto-Biblioteko“, kiu enhavos plejparte manuskriptojn. Ĉiu faka organizaĵo kreu kaj administru sian fakan bibliotekon, kiu formos parton de la universala biblioteko. Ankaŭ ni poŝtistoj starigu tian fakan bibliotekon. Depost la 1-a de Aprilo 1923 oni traduku la du oficialajn bultenojn „Amtsblatt des Reichspostministeriums“ (eldonnombro 31.000) kaj la „Postnachrichtenblatt“ (eldonnombro 33.000), uzu paperon en la formato 22—28½ cm. (formato por skribmaŝinoj) kaj lasu libere sufiĉe larĝan randon en ĉiu direkto por faciligi la laboron de la bindisto. Ankaŭ tradukoj de gravaj kaj interesaj artikoloj el la poŝtfaka gazetaro estas dezirataj. Oni surskribu la paperon nur unuflanke, se oni povas esperi postan presadon. La rajto de multobligo estas rezervata al la verkintoj, eldonistoj kaj tradukintoj. La manuskriptoj povas esti pruntedonataj nur al Ilepanoj. Antaŭ la envicigo de la plibonigotaj manuskriptoj en la bibliotekon la poŝtfakaj esprimoj estas elĉerpotaj por la faka vortaro. La samesprimoj estas elĉerpotaj por la faka vortaro. La samideanoj en la aliaj landoj estas petataj agi sammaniere kaj sendi la korektitajn manuskriptojn al s-o O. Reber, Kapuzinerstr. 33, en Bamberg, Germanio. Ĉiu tradukaĵo sendita al la prezidanto de Ilepo estas paŝo antaŭen al la venko.

Ne forgesu aboni „La Poŝtiston“ kaj sendi vian kotizon (se eble almenaŭ la salajron por unu laborhoro) al la poŝtĉekkonto n-o 9957 ĉe la „Postscheckamt Nürnberg“, de s-o O. Reber en Bamberg, O. Rieck, poŝtdirektoro Wolgasterstr. 38/b, Greifswald.

Ĉeĥosl. ŝtata sekcio de „ILEPO“. Prezidanto Sro. F. Ulbert poŝtdirektoro Karl. Vary — Karlsbad.

Sekretario: Sro. F. Ullrich poŝtoficisto Sloup — Bürgstein.

Landa sekcio por Bohemio:

Delegito: Sro. A. Sikl poŝtofikisto Praha 4.

Afable kunlaboras Sino. Hemerová Praha II., Krakovská 17.

I. distrikta sekcio: Gvidanto Sro. J. Bohač Mimon-Niemes.

Landa sekcio por Slovakujo:

Delegito: Sro. H. Stiburek Bratislava 1. oddel. V.

Sino. Hemerová gvidas esp. angulon en la fakgazeto: „Pošt. obzor“.

Tie ŝi ankaŭ aperigis pri Ilepan artikolon, kaj varbas por aranĝota esp. kurso inter la Prahaj gepoŝtistoj. Ni dankas al ŝi multe por nia sukceso. Same nia Slovakuja landa delegito senlace laboras, kiel montras la ĝojinda sukceso en tiea lando.

Nia nuna laboro estas varbi kaj organizi.

Jugoslavujo-kvaronjaro raporto (Novembro 1922. januaro 1923). La subetenditajn petojn (vidu La Poŝtisto No. 1. 1923) ĝis nun respondis favore: Sro. *Budisavljević*, direktoro de la p. t. t. direkcio en Split; Sro. *Jostfović*, direktoro de la p. t. t. Direkcio en Novi Sad; Sro. *Debelich*, direktoro de p. t. t. direkcio en Ljubljana, kiu sendis adresojn de 24 gekolegoj interesiĝantaj pri nia lingvo. La sekcio tuj skribis al ĉi tiuj gekolegoj donante al ili la necesajn informojn.

El la organizoj de p. t. t. oficistoj en Jugoslavujo respondis ĝis nun nur la komitato de la „Organizo de la p. t. t. oficistoj en Zagreb (Kruatujo)“, kiu komitato ĉe la lasta kunsido decidis helpigadi la agadon de ĉi tiu Ŝtata Sekcio de Ilepo, kaj regule publikigadi artikolojn kaj sciigojn pri nia lingvo kaj ligo en sia oficiala monata organo „Poŝta“ (La Poŝto).

Krankam la organizo de p. t. t. oficistoj en Bosnujo kaj Hercegovinujo ĝis nun ne respondis — tamen ĝia oficiala monata organo „Bos. i. Herc. Poŝtar“ (Bos. kaj Herc. Poŝtisto“) jam de plilonga tempo favorigadas nian aferon publikigadante niajn sciigojn, informojn, artikolojn ktp. Lastatempe aperis en ĉi tiu nia fakorgano artikoloj: La poŝtistoj en Estonujo (Laŭ la leteroj de kolegino *Fino* Hilda Drezen, Tallin.) kaj „Niaj kolegoj en Anglujo“ (de kolego Westmancote, Bristol).

Laŭ la informo ricevita de la komitato de la „Unuiĝo de la Publikaj Oficistoj“ en Zagreb, la komitato pritraktos la proponon rilate la publikigado de Esperanto lingvaj artikoloj en la organo de la unuiĝo „Naš Glas“ („Nia voĉo“). Interkonsente kun la delegitoj de la unuopaj distriktaj Sekcioj de Ilepo — la Sudslava Ŝtata Sekcio ŝanĝigis (pro la malbonaj materialaj cirkonstancoj de nia membraro) jenajn punktojn de la interna regularo (vidu „La Poŝtisto“ No. 1—1922).

1. Por ebligi al ĉiuj niaj p. t. t. kolegoj aliĝi nian ligon — la jara kotizo estas fiksita je 10 din.

3. Pro la plialtigo de la jara abono de nia „La Poŝtisto“ (30 din.), kio malebligas, ke ĉiu membro estu ankaŭ abonanto de nia oficiala organo — estas dezirinde, ke ĉe ĉiu pli granda oficejo la membroj kune abonigu almenaŭ 1 ekzempleron.*

4. punkto (distrikta kotizo) estis furstrikita.

5. Membro, kiu dum 2 monatoj post la aliĝo ne estas paginta la kotizon — estas rigardata kiel eliĝinta. estas paginta la kotizon — estas rigardata kiel eliĝinta.

7. punkto (Subvencado de la Ŝtata Sekcio) estis forstrikita.

Statistiko:

	Distr.	Sekcio por		
Dalmatujo:	37	gekolegoj	ce 15	p. t. t. oficejoj
Bosn. kaj Herc.	32	„	„ 20	„
Kroatujo kaj Slavonujo	8	„	„ 4	„
Slovenujo	24	„	„ 4	„
Serbujo	1	„	„ 1	„
entute	102	„	„ 44	„

Enspezoj (monkolekto sendita de niaj kolegoj en Split)	100 Din.
Elspezoj (laŭ la la raporto) 99·50	
de 1. Nov. 1922—31. Jan 1923 53·45 =	152·95
Elspezoj	52 Din. 95

Nicola Lisac prez.

* Se ĉiuj abonas, tiam plimalaltiĝas la abonprezo. Rim. de la Red.

La Internacia Konvencio pri la transporto de komercaĵoj per fervojo. (Bern, 14. X. 1890.)

(Prova traduko de sup. sekr. ferv. E. Muthschall, Forst (Lausitz. Germanlando).

(Daŭrigo).

Artikolo 3. 2. Je certaj kondiĉoj estas transportataj:

1. la objektoj montritaj en la aldono 1 je la kondiĉoj tie montritaj. Al ili estas aldonotaj specialaj ŝarĝnotoj ne enhavantaj aliajn objektojn.

2. or- kaj arĝentfandaĵoj, plateno, mono, monvaloraj moneroj kaj poperoj, dokumentoj, altvaloraj ŝtonoj, puraj perloj, valoraĵoj kaj aliaj multekostaĵoj, plue artobjektoj kiaj estas; pentraĵoj, statuoj, objektoj el bronzfandaĵo, antikvaĵoj. Apartenas al la multekostaĵoj ekzempleankaŭ puntoj speciale altvaloraj kaj brodaĵoj speciale altvaloraj.

Tiuj-ĉi objektoj estas akceptataj en la internacia trafiko, kun la internacia ŝarĝnoto, aŭ konforme al interkonsentoj de la partoprenintaj registaroj, aŭ al tarifdestinoj, kiuj estas donitaj de la fervojaj direkcioj rajtigitaj al tio kaj kiuj estas aprobitaj de ĉiuj kompetentaj estraĵoj inspektantaj (kontrolantaj).

3. kadavroj.

Ili estaj akceptataj por internacia transporto kun la internacia ŝarĝnoto je jenaj kondiĉoj:

a) la transporto efektiviĝas per granda rapideco,
b) la transportkostoj devas esti pagitaj je la allivero,
c) la kadavro devas esti akompanata de persono al tio komisiita,
d) la transporto okazas en la regiono de ĉiu ŝtato sub la leĝoj kaj dekretoj policaj specialaj, se tio ne estas regulita inter la ŝtatoj per specialaj konvencioj.

(3) Kelkaj, aŭ ĉiuj kontraktintaj ŝtatoj povas interkonsenti rilate al sia reciproka trafiko ke tiuj objektoj, esceptitaj de la internacia trafiko laŭ la nuna Konvencio, estu akceptataj je certaj kondiĉoj, aŭ ke la objektoj noŭtaj en la aldono 1 estu akceptataj je kondiĉoj malplirigoraj. Tiaj aranĝoj povas esti farataj — se necesas, per helpo de la Centra Oficejo por la Internaciaj Fervojaj Transportoj en Bern — per korespondo, aŭ per faka konferenco kunvokita por tiu-ĉi celo. Ankaŭ la patoprenantaj fervojoj povas pere de tarifoj, akcepti objektojn kiuj estas esceptitaj de transporto, aŭ povas permesi malpli rigorajn kondiĉojn por la objektoj kondiĉe akcepteblaj, supoze ke

a) la internaj reguloj permesu la transporton de la koncernaj objektoj, aŭ la kondiĉojn pro tio projektitajn, kaj

b) estu aprobitaj la tarifaj destinoj de ĉiuj kompetentaj estraroj inspektantaj.

Komplementaj destinoj. 1. Artobjektoj kiaj estas pentraĵoj, statuoj, objektoj el bronzfandaĵo, antikvaĵoj estas permesataj por transportado per granda, aŭ malgranda rapideco.

2. La kompensoj pagotaj eventuale por tiaj artikloj estas bazitaj sur la prezo estanta, aŭ sur la ordinara valoro kaj ne devas superi 150 frankojn po 100 kilogramoj. Deklaro pri intereresо je la livero ne estas permesata.

Valoro de la tarifaj destinoj. Koncerne la internaciaj transportoj valoros la kondiĉoj de la komunaj tarifoj de la fervojaj unuiĝoj, aŭ asocioj, same kiel tiuj de la tarifoj specialaj de ĉiu fervojo, se ili ne estas kontraŭaj al la Konvencio; aliokaze ili estos konsiderataj kiel senvaloraj.

Artikolo 5. Devo je transporto por la fervojoj.

(1) Ĉiu fervojo, montrita laŭ artikolo l'devas, konforme al la destinoj kaj kondiĉoj de tiu-ĉi konvencio, prizorgi la ekspedon de transportaĵoj en la internacia trafiko, kondiĉe:

1. ke la forsendanto sin submetas al la normoj de tiu-ĉi konvencio;

2. ke la transporto estas ebla per la normalaj transportiloj;

3. ke cirkonstancoj, kiuj estas konsideataj kiel superfortaj, ne malebligas la transporton;

(2) La fervojoj estas devigataj transpreni por ekspedo la transportaĵojn nur, kiam ilia transporto tuj povos esti efektivigata. La specialaj normoj, valorantaj por la ekspeda stacio, destinos, ĉu tiu-ĉi estos devigata, provizore transpreni en deponejon tiujn transportaĵojn, kies ekspedo ne tuj povos efektivigi.

(3) La ekspedo de la transportaĵoj okazos en la sama vico, laŭ kiu ili estas transprenitaj por ekspedo, se ne la fervojo povos aserti sufiĉan kaŭzon por escepto bazatan sur la neceseco de la fervoja mastrumado, aŭ sur la publika intereso.

(4) Ĉiu kontraŭago al la destinoj de tiu-ĉi artikolo motivas la pretendon al kompenso de la malgajno kaŭzita.

(5) La translivero kaj la envagonigo de la transportaĵoj estas regulataj, laŭ la leĝaj kaj reglementaj destinoj valorantaj por la fervojdirekcio de la ekspeda stacio.

Komplementaj destinoj. 1. La fervojo estas devigata transpreni por transporto objektojn, kies en — kaj elvagonigo postulas la uzon de specialaj maŝinoj, nur al tiuj stacioj kie ekzistas tiaj masinoj.

2. La fervojo povas meti sub specialaj kondiĉoj, aranĝotaj por ĉia kazo, la transprenon de tiuj objektoj, kies envagonigo, aŭ transporto prezentas, laŭ opinio de tiu direkcio sub kiu estas la ekspeda stacio, neordinarajn. malfacilajojn.

3. La lokomotivoj, tendroj, vaporveturiloj kal aliaj fervojveturiloj rulantaj per siaj propraj radoj, estas transprenataj al transporto nur, se ili estas elprovitaj de fervoja administracio rilate al sia rulkapableco, se ili surhavas noton pri tiu-ĉi elprovo, aŭ se ili estas akompanata de dokumento atestanta ĉi-tion. Ili ne povas ruli sur malpli da aksoj ol respondas al ilia konstrukcio.

La lokomotivoj, tendroj kaj vaporveturiloj rulantaj sur propraj radoj devas esti akompanataj de kompetenta komisiito de la forsendlnto, kiu prizorgos la lubrikadon.

Raporto de la reprezentanto de Ilepo en Estonio. En Estonio la Esperanta movado inter poŝt-kaj telegrafoficistoj ne estas tre vigla. Ties kaŭzo verŝajne estas, ke entute la Esperanta movado en nia lando estas ankoraŭ juna. Ni tamen esperas ke nia afero kreskos, ĉar jam estas rimarkebla malgranda progreso. En tiu-ĉi jaro en la ĉefurbo Tallinn aniĝis al Ilepo 10 poŝt-kaj telegrafoficistoj. Tio estas preskaŭ la tuta ĉi-tiea poŝtista esperantistaro; krom ili ekzistas ankoraŭ nur kelkaj komencantoj, kiujn ni estontece esperas varbi por nia afero. Trovante ke nia aro estas ankoraŭ malgranda por fondi fakgrupon, ni prokrastas tion ĝis tempoj, kiam ni estos certaj, ke nia laboro estos pli fruktodona kaj nepre bezona. Apartaj kursoj por poŝtistoj ĝis nun ne estis aranĝitaj. La poŝtistoj, dezirintaj lerni Esperanton, vizitis la kursojn aranĝitajn de la loka Esperanta societo. Estis dissendita al poŝtistoj-esperantistaj en la aliaj urboj de Estonio alvoko aniĝi al Ilepo kaj aboni la fakan gazeton, sed la alvoko restis preskaŭ sen rezultato. Kelkaj ne deziras pli frue aniĝi, ol ili pli perfekte estos ellernintaj la lingvon. Nur el Tartu aniĝis unu kolego. Do sume Ilepo havas en Estonio 11 anojn. Iom malhelpas la progreson de nia afero tio, ke en la lasta monato la poŝtadministracio malpermesis akceptadi Esperantajn telegramojn, adresitajn eksterlandon. Ĝis nun oni la akcepton ne rifuzis. La malpermeson la poŝtadministracio bazas sur la Internacia Telegrafa Konvencio. Nia loka Esparanta societo promesis esplori la aferon kaj esprimi proteston. Estus interese ekscii ĉu en aliaj landoj ekzistas ankaŭ tia malpermeso, kaj se Estonio ne estas escepto en tiu rilato, ĉu Ilepo ne povus entreprine ion por neniigi ĉi-tiun dekreton?

Raparto pri la Poŝtesperantista Fratgrupo en Dresden. La subskribinto gvidis en la jaroj 1908 kaj 1909 kelkajn Esperantajn kursojn. Poste oni decidis fondi specialan grupon por poŝtistoj. La 15-an de Decembro 1909 estis fondita la poŝta esperantista unuiĝo Zamenhof, laŭ mia scio la unua tia unuiĝo. Ĝi laboradis fervore kaj kolektis adresojn de tutmondaj kolegoj kaj fondis la internacian ligon de esperantistaj poŝtoficistoj. Pri ĉi tiu ligo jam raportis la nuna prezidanto So Reber en la lasta numero. La unuiĝo havis antaŭmilite preskaŭ 100 membrojn kiuj grandnombre kiel militistoj mortis en la milito. Post la milito la unuiĝo longtempe ne kunvenis kaj kiam fine oni kunvokis la membrojn, nur kelkaj sekvis la inviton. Nun la unuiĝo komencis denove laboradi por gajni adeptojn. Ĝi nun estas grupo de la granda Dresdena Esperanto unuiĝo kaj laboradas laŭforte. En 1922 la grupo aranĝis 3 kursojn en kiuj partoprenis pli ol 80 geposhistoj. La 15-an de Decembro, la grupo aranĝis specialan feston, kie partoprenis polica fratgrupprezidanto A. Pohle. Ni esperas en 1923 denove atingi la nombron de 100 membroj. Antaŭen ĝis la venko. En Januaro la grupo komencis novan kurson kiun partoprenas 15 gekolegoj. En Februaro la grupo aranĝis konkurson literaturan, 7 libropremioj povis esti disdonitaj. Multaj membroj abonis la Policistan. Nun la grupo prepariĝas por partopreni la dekkvinan. Paul Smidt Dresden, Kesselsdorferstrasse No 72.

Poŝtistesperantista Fratgrupo de München. Okaze de la kristnaskofesto de la Münchena esperantista grupo oficiale fondiĝis la poŝtista fratgrupo. Provizora estro fariĝis frato J. Jacob supera poŝtoficisto, provizora vicestro O. Maurer supera poŝtinspektoro, prov. sekretario Ferd. Baŭer poŝtinspektoro, prov. kasistino Fr-no Kath. Hirschmann poŝta asistentino. La instruado por la poŝtistaj fratoj denove rekomenciĝis. (15 partoprenantoj.) Instruantoj estas So H. Koch v. del. de U. E. A., magistrata sekretario kaj nia tiea grupestra frato. La grupa adreso estas: So J. Jacob, München 2, N. W. 10., Blutenburgerstrasse No 17. I/b. (Bavarujo-Germanujo.)

Split. (Dalmatio-Jugoslav.) La agema loka grupo disdonis alvokojn por la instruistoj. Amuziĝa vespero okazis je la pasinta monato. Poŝtista kurso. Nova movado en Sanjina. Ĉiun laŭdon meritas So Rupčič grupa prezidanto kaj So Margetič. Saluto kaj gratulo.

Seul. (Koreujo.) La 24-an de Septembro pasintjara So T. Ojama propagandparolis tie, ĉe la administrejo de poŝtaj aferoj. Ĉeestis 600 personoj. De la 1-a de oktobro daŭriĝas la Esperanto-kurso.

Poŝtistesperantista Fratgrupo de Tampico (Mexico). Anahuac, estas la nomo de nia tiea grupo ĝia nombro kreskas kaj ĉiuj ĝoje studas nian karan lingvon. Por ĉiu afero, sin turnu al la Sekretario S-o Ernesto E. Guerra, Poŝtestro, Tampico, México.

E, kaj la senfadena telefonio. Kelkaj sam. interesiĝantaj pri T. S. F. intencas fondi gr. por faciligi internaciajn rilatojn per E. Sekr.: Aug. André, 15, rue Bellefond, Paris (9°).

„I. A. E. F."

Raporto pri la ĝisnuna laboro de I. A. E. F. *(Pro manko de sufiĉa spaco ni estis devigitaj mallongigi la divernsajn ricevitajn raportojn kaj protokolojn.) Dum la antaŭkunsido de la fervojistoj, okazinta dum la XIV.; fariĝis prezidanto So Blažek (Cslv.) kaj sekretario H. Salokannel (Finnl.). Ĉeestis 13 fervojistoj el 4 landoj. La sekr. disdonis ekzempl. de la finul. ferv. fakrevuo „Rautatielainen", kiu enhavis saluton de finnl. fervojist. al la fremdlandaj fakkkamaradoj. So prez. Blažek salutis la kunsidon kaj proponis programon por la I-a fakkunsido. Akceptata. La sekretario invitas viziti fervojajn konstruaĵojn kaj muzeon. Akceptata. Landaj delegitoj, sveda, finna, estlanda promesis raporti pri la sialandaj esp. movadoj. Prezidanto prezentas la asocian statistikon (240 membroj) kaj parolas pri la faka organo „Fervoja Esperantisto". Entuziasma finiĝo. (1922 la 8-an de VIII. H. Salokannel p. m.)*

La unua fakkunsido okazis je la 12-a de VIII. 1922. Prezid. So Blažek, sekr. So Salokannel. Ĉeestis 13 ferv. el Ĉeĥoslovakujo, Rusujo, Norvegujo kaj Finnlando.

So Lilquist (Finnl.) salutas la gastojn kaj la prez. varmkore respondas. La sekretario laŭtlegas leteron de So Habellock ĝisnuna prezidanto, kiu salutas la kongreson, dankas al la helpantoj, deziras al la asocio belegan progreson kaj rezignas pri la ofico de prezidanto proponante ke pro la nunaj pezaj cirkonstancoj oni elektu estraron samlandan. Oni aplaŭdas kaj dankas al la ĝisnuna prezidanto.

La sekretario laŭtlegas la protokolon de la antaŭkunsido. Akceptata. La prezidanto prezentas la programon (akceptata) kaj raportas pri la ĝisnunaj asociaj, organizaj kaj financaj okaziataĵoj de „I. A. E. F.". El ĉi tiu raporto la ĉeestantaro sciiĝis, ke „I. A. E. F." estis refondita dum la XIII-a en Praha kaj unue fondita dum la V-a en Barcelono (1910). La mondmilito malaperigis la asocion, kie multon alian. La asocia programo estas: 1. la disvastigo de E. inter la fervojistaro, 2. verki fervojan terminaron, 3. plifaciligi la disvastiĝon de novaj fakideoj, 4. eldoni ĉiujare esp. fervojistan nomaron, 5. plifactligi someran interŝanĝon de ferv. infanoj, 6. prizorgi senpagan veturadon, rabatoj ĉe enloĝiĝoj, plifaciligi kaj organizi la partoprenon en la estontaj U. K. de E. kaj organizi dum tiuj fakkunsidojn. La raporto citas la gravecon de la fakrevuo kaj ĉagrenas pri tio, ke nur la 3-o no de la membraro ĝin abonis (!!!!) Raportisto sciigas, ke So Habellock prizorgas la redaktadon de la fakterminaro So Kašparek la kason kaj financojn kaj raportinto la korespondadon kaj administracion (aplaŭdo). La kasa bilanco montras 3731·56 ĉk. enspezon kaj 650·70 ĉk. elspezojn (legitimacioj, aliĝiloj, ŝtampiloj, postelspezoj); do la kasa restaĵo montras ĉk. 2080·86. La nombro de la aktivaj membroj estas 243, kiuj apartenas al 15 diversaj nacioj. La estraro kunvenis je la 4-a de XII·1922 en germana limstacio Mittelwalde kaj ankaŭ poste en Breslaŭ. Multajn malfacilaĵojn kaŭzis la asocia organo. Raportinto sciigas, ke li ne povas plu akcepti sekretarian oficon pro oficialaj laboroj kaj skizas la malfacilan situacion de la komitatanoj, kiuj devas multe korespondi pri la ne apero de la fakgazeto kaj alvokas la ĉeestantaron por kunhelpi je la afektivigo de granda riĉenhava fakrevuo. Fine raportinto salutis la kongreson. (J. Blažek p. m.) Aplaŭdo.

Nun sekvis la raportoj de la diversaj naciaj reprezentantoj: En ĉeĥoslovakio. La fakministro donis limpostenojn Ĉefe al esperantistoj. La scipovo de E. devas esti enskribita en la kvalifikaciajn listojn. Antaŭ du jaroj aperis of. cirkulero admonanta lerni E. Kursoj por ferv. en multaj urboj. En Bavarujo. La fakministro tre favoras E. Oni uzas tie E. en fervojaj aferoj. En München estas por E. kursaj celoj disponigita senpaga ĉambro. En Norvegujo. Alvenintan esp. cirkuleron oni donis al So Bonnevie por norvegigi. En Finnlando komenciĝis la esp. movado jam en 1902. De la jaro 1904, aŭ 1906 jam ekzistas esp. kolegoj. La trafikdirektoro T. Blässar estas esperantema. So Solokannel antaŭpreparis la fakkunsidon per cirkuleroj, alvokoj kaj paroladoj. Li aranĝis dum 16 jaroj multajn kursojn. Nun estas en Finnlando proksimume 50 ferv. esperantistoj.

Post la landaj raportoj oni fiksis la jarkotizojn, kiuj la jenaj estas: 5 ĉk.; 30 Mk. (germ., eston., leton., litv.); 10 Mk. (finna); 2 Fr. (svisa); 4 Fr. (franca, belg.); 2 ŝil.; 2 Kr. skand. (sved., norv., dan.); 5 Liroj; 10 Dinaroj; 2 Pesetoj; 10 Lejoi; 20 Levoi; 400 Kr. aŭstroj; 200 Kr. hung.; 250.000 rubloj rusaj; 1 Guld.; 2 Jenoj; 2 svis. fr. por ceteral landoj. La enskribo pago estas la duono de la jara kotizaĵo. Poste oni laŭtlegis la sekvantajn statutojn:

Statutoj

de la internacia asocio de la esperantistaj fervojistoj.

(I. A. E. F.)

Nomo kaj celo:

„Internacia asocio de la esperantistaj fervojistoj" kiu celas:

a) propagandi kaj instrui la lingvon E. inter la fervojistaro,

b) eldoni fakan terminaron kaj fakrevuon,

c) plifaciligi al la geasocianoj kaj iliaj familianoj la vojaĝadon kaj restadon en eksterlando,

d) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco.

La asocio estas neŭtrala rilate al religio, nacieco kaj politiko. En ĝi viroj kaj virinoj estas egalrajtaj kaj elekteblaj en ĉiujn oficojn.

Membreco:

La membreco de la asocio konsistas el

a) membroj aktivaj,

b) „ subtenantaj,

c) „ dumvivaj (kiuj pagas minimume 100 frankojn svisajn,

d) membroj honoraj.

Membro aktiva povas fariĝi ĉiu fervojisto, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, kiu pagas la kotizon kaj plenumas la postulitajn kondiĉojn.

Ĉiu fervojista asocio, aŭ entrepreno (ne-esperantista), kiu pagas la postulitan kotizon, rajtas aliĝi al la Asocio kiel membro subtenanta.

La membreco finiĝas:

a) kiam la ano ne pagas sian kotizon ĝis fino de la asocia jaro,

b) per kriba eliĝdeklaro al la estraro de la asocio,

c) la eksigo okazas, se la membro agas kontraŭ la bono de la asocio,

d) la eksigita membro rajtas apelacii kontraŭ sia eksigo ĉe la jarkunveno.

La regula kotizo por la jaroj 1922/1923 por membroj aktivaj kaj subtenantaj estas jam en antaŭaj linioj menciita. (Ĝi estos ĉiujare denove starigota).

Membroj subtenantaj pagas tiujn samajn prezojn, sed ili ne voĉdonrajtas. La kotizo ĉiujara estas fiksata denove de la jarkunveno. La kotizo estas pagata al la kasisto en nacia mono, per registrita letero, aŭ prefere per bankĉeko. Ĉiu membro, kiu pagis la koncernajn kotizojn, ricevas legitimacion (membrokarton), kiu estas prolongigota ĉiujare.

Administracio.

La estraro konsistas el:

a) la prezidanto kaj vicprezidanto,

b) la sekretario

c) la kasisto kaj

d) unu asesoro el ĉiu lando, inter kiuj devas esti la redaktoro de la asocia organo. Asesorojn elektas nur la landoj, kiuj havas membrojn en la asocio.

La estraranoj estas balotataj de la asocia jarkunveno per absoluta plejmulto por la tempodaŭro de du jaroj. La estrara sidejo estas la loĝloko de la prezidanto, aŭ vicprezidanto.

La prezidanto reprezentas la asocion ĉiuflanken. Asocitaĝo.

La estrako kunvokas la jarkunvenon (ĉefkunvenon) (ĉiujare, plejparte okaze de la Universala Kongreso de Esperanto kaj publikigas la tagordon almenaŭ 13 semajnojn antaŭ ĝia okazo.

La proponoj diskutotaj en la ĉefkunveno ne devas alveni al la estraro pli malfruе ol 10 semajnojn antaŭ la kunveno kaj devas esti skribitaj en Esperanto.

Disiĝo.

La disiĝo de la asocio povas okazi nur, se 4/5 de ĉiuj membroj por tio voĉdonas. En tiu okazo la havaĵon ricevas la unuigita Konstanta Reprezentaro.

Post la aprobo de koncernaj paragrafoj en la regularpropono oni elektis sekvantajn funkciantojn:

Kiel prezidanton, s-ron *G. Bontemps*. Francujo, Colombes (Seine) 4 Villa de Cerises,

kiel vicprezidanton. s-ron *J. Blažek*, Ĉeĥoslovakujo, Olomouc, Müllerova 27,

kiel sekretarion, s-ron *J. Barvir* fervoja konsilanto, Ĉeĥoslovakujo, Brno ĉe fervoja direkcio departemento II,

kiel kasiston, s-ron *E. Kubásek*, Ĉeĥoslovakujo, Plzen Lobezská 12 kaj unu asesoron por ĉiu aliĝinta lando. Kiel asesoroj s-ron *Salokannel*, por Finnlando, stacio Laihia, s-ron *G. Habellok*, Germanujo, Breslau 10, Schleirmacherstr. 19, s-ron *H. Bonnevie*, Norvegujo, Kristiania, Bergslinien 11, s-ron *K. A. Elfving*, Svedujo, Vesteras Linders 3, s-ron *J. Ivánović*, samtempe por redakcio de *„La Fervojisto"*. Je la fino de la fakkunsido sro Blažek informas la konferencanojn pri sia salutparolo al la gekongresanoj de la XIVa farita en la 2a laborkunsido de la Kongreso.

Dum la dua kunsido, kiu okazis je la 14-a de VIII. kaj en kiu partoprenis 7 anoj el 4 landoj oni decidis, ke:

la membraro de la asocio specigas je a) *aktivaj*, b) *subtenantaj*, c) *dumvivaj kaj* d) *honoraj membroj. Plue ke la estraro estu kompletigota per 1—1 asesoro el ĉiuj landoj kaj per la redaktoro de la fakgazeto. La asesoroj mem elektas siajn helpantojn, aŭ delegitojn. La abonpago estu ĉiam sendota al la redaktoro de la fakrevuo. [Nun al „La Policisto" Budapest IX. Üllői-ut 59., IV. 8. (Hung.)] Esprimite estis la deziro, ke multaj kunhelpu al So Habellock en la verkado de la fakterminaro. So Blažek estis komisiita sendi dankleteron al la antaŭa prezidanto. Fine So viceprezidanto per elokventa parolado dankis al ĉiu, kiu kunlaboris la helpon, indigis ĉies meriton kaj kun entuziasmaj vortoj esprimis la deziron por la revido dum la XV-a en 1923. Ĉiu aplaŭdegis lin kaj la senlacan finnan fraton S-on H. Salokannel, la lertan kaj eminentan sekretarion.*

Kelkaj vortoj de la redaktoro de ĉi tiu revuo al la poŝtistaj kaj fervojistaj fratoj. La skribinto de ĉi tiuj linioj estas tiel feliĉa, ke la revuo kiun li eldonas fariĝis la oficiala organo ankaŭ de la poŝtista kaj fervojista organizaĵoj. La nomito konfesas, ke li ne havas la rajton por la plendo, li nur forgesis, ke ankaŭ alia faktoro estus devinta enkalkulita esti; nome la abonemo de la fakuloj. Li rekonis la grandajn meritojn kaj la superhoman sindonecon kaj memoferemon de la poŝtista kaj fervojista fakliga estraro. Li volis al ĉi tiuj veraj apostoloj helpi per bona fakrevuo. Sed, kio okazis? Nur kelkaj poŝtistaj kaj fervojistaj abonoj alvenis, kiuj entute eĉ ne la poŝtelspezojn kovris. La eldonanto de ĉi tiu revuo do devas iom limigi sian propran oferemon, ĉar sendube neniu povas de li postuli, ke li por kelkdekoj de abonantoj el la propra poŝo financu la propagandadon de du mondfakmovadoj. Li nur petas de ĉiu poŝtista kaj fervojista frato, ke ĉiu ricevanto de ĉi tiu numero ne kritiku pri la mallongigitaj sciigoj, pri la mankoj, kaj pri aliaj aferoj; ĉar ĉio, kiun li ĝis nun faris por la poŝtista kaj fervojista movado devas esti konsiderata kiel pura donaco kaj ideala helpo al la nomitaj movadoj. Nomito tre dankas la ĝisnunan konfidon kaj petas ĉiun ricevanton ke tiu bonvolu aboni kaj abonigi la revuon — aŭ resendi. Se ĉiu faras sian devon, tiam oni povas vivigi belegan k. t. p. an fakrevuon. Oni prenu ekzemplon pri fratoj Habellock, Reber, Blažek, Kubašek, Lisac, Solokannel kaj ankoraŭ pri kelkaj fakfratoj poŝtistaj kaj fervojistaj kies superhoman laboron oni ne senfruktigu. Aliĝu do ĉiu al sia fakligo kaj abonu ĉiu nian komunan fakrevuon. La tiu-ĉicelaj elspezoj neniun savus.

Eraro. Sinjoro vicprezidanto de „I. A. E. F." Blažek sciigas nin, ke la cirkuleroj dissenditaj de S-o Kubašek erare nomas nian revuon „La Esperantisto" anstataŭ ĝin nomi kiel „La Fervojisto"-n. Ĉi tiu erararo kaŭzis malagrablaĵojn, ĉar multaj fervojistoj rifuzis nian revuon skribinte, ke la oficiala organo de „I. A. E. F." estas „La Esperantisto" — kies abonigo estas devigata.

Alvoko. Ĉiu fervojisto klopodu fondi lokan grupon. Policistoj kaj poŝtistaj fratoj estas petataj helpi al la fervojistoj kaj propagandi inter ili. Montru ni fine, ke ni povas ion fari kaj ke ni estas fratoj.

APOTEKO-KRIEGNER
„Hungara Korono"
Budapest (Hung.), Kálvinplaco.
„Akacio" Kremo, pudro kaj sapo.
Eksportanto de la eminenta kaj ĉie-konata.
Kininfero-vino. Petu prospektojn.

J. NEOGRÁDY
Meblisto. Budapest, IX. Ráday-utca 24.
Mebligo de loĝejoj, oficejoj.